

Joseph Freiherr von Eichendorff,  
**La rompiĝinta ringeto**  
*tradukita de Chr. Pfeufer*

En ombra valo turnas  
 muela rado sin.  
 Jen loĝis mia kara -  
 ĝi nun forlasis min.

Fidelon ĝi promesis,  
 ringeton donis ĝi:  
 Fidelon ĝi forgesis,  
 rompiĝis ring' de mi.

Migradi mi dezirus  
 for, kiel muzikant';  
 kaj kie ajn mi irus,  
 resonus mia kant'.

Mi volus bataladi,  
 rajdante tra l'kampar',  
 ĉe l'fajro dormkuŝadi  
 dum nokt' en la tender'.

La rado plu rondiras;  
 revante aŭdas mi.  
 La morton mi sopiras,  
 kvieton donus ĝi.

*Traduko de la Germana poemeto “In einem kühlen Grunde” de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (\*1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de Chr. Pfeufer.*

Arg-1035-2101 (2014-05-31 17:34:45)

*Tiun ĉi kanto-tradukon mi, Manfred Retzlaff, trovis en la libro “Internacia Kantaro”, eldonita en 1922 de la eldonejo Ferdinand Hirt und Sohn en Lepsiko (Leipzig), Germanio. La kantojn kolektis kaj eldonis Paul Bennemann, sur la paĝo 22 kaj 23. Erare estas indikite tie, ke la poeziaĵon verkis Wilhelm Müller.*

Joseph Freiherr von Eichendorff,  
**Convalle in rorata**  
*tradukita de N. N. 95*

Convalle in rorata,  
 En, rota crepitat;  
 Puella mi amata  
 Hic iam non habitat.

Que fides erat pacta  
 Donato anulo,  
 Ab illa iam est fracta  
 Cum dono aureo.

Cum lyra peragrare  
 Nunc velim ultima  
 Et cantica cantare,  
 Adire ostia!

Nunc volem datis loris  
 In atrox proelium,  
 Ad ignes cubem foris  
 Obscura nocte tum!

Cum crepant rotae tortae,  
 Quid velim, nescio;  
 Ac si occumbam morte,  
 Sit quies subito.

*Traduko de la Germana poemeto “In einem kühlen Grunde” de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (\*1788-03-10 – †1857-11-26) en la Latinan de N. N. 95.*

Arg-1035-2103 (2014-05-31 18:16:34)

*Tiu ĉi latinigo trovigas en <http://ingebo.org/Lieder/ineinemk.html>.*